Augustin Wibbelt,

Falĉil-akrigado

tradukita de Manfredo Ratislavo

Kiel kantado
En la trankvilo,
Kiel sonado
De sonorilo
Sonas arĝente
La akrigad' de falĉilo!

Tra la kamparo
Iris mi, kiam
Brilis la suno;
Ĝojis mi tiam.
Ho, mia koro,
Kiel batadis ĝi iam!

Greno-falĉiloj,
Kiuj promesis
Tian feliĉon,
Soni nun ĉesis –
Kaj la feliĉon,
Preskaŭ mi ĝin jam forgesis.

Traduko de la Basgermana poemo "Seißengedengel" de Augustin Wibbelt *(∗1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-470-907 (2010-02-20 18:14:03)

Profesoro d-ro Hans Taubken, kunlaboranto kaj estrarano de la societo "Augustin Wibbelt", afable permesis al mi, Manfred Retzlaff, per retletero de l' 30.04.2008 la enretigon de miaj tradukoj de poemoj de Augustin Wibbelt. Vidu ankaŭ la retejon de la societo "Augustin Wibbelt": http://www.muenster.org/wibbelt/.